

L A

PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA
 REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO : PRAHA-VII, SOCHAŘSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kč 20.—; fremdlando Kč 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
 lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Pošta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271

Z ESPERANTSKÉHO SVĚTA.

Švýcarská poštovní správa podporuje esperanto. Zaměstnanci švýcarské pošty a tamního telegrafu byli upozorněni svými úřady, že jim budou z veřejných prostředků nahrazeny poplatky za učení esperantu, budou-li navštěvovati kurs tohoto jazyka.

Lektorát esperanta na krakovské universitě. Profesor Tadeusz Hodakowski byl jmenován lektorem esperanta na universitě v Krakově. U nás máme esperantský lektorát na vysoké škole technické české i na německé technice v Praze, mimo to na vysoké báňské škole v Příbrami.

Samojlovič pro esperanto. Sovětský polární badatel Samojlovič, jenž roku 1928 začal zbytky italské polární výpravy a nyní zřídil v dalekém Severu meteorologické stanice, prohlásil při své poslední návštěvě v Praze, že jest věrným přítelem esperanta. Pokládá je za důležitý prostředek k usnadnění spolupráce mezi národy a podle jeho mínění mělo by všeobecně zavedení esperanta velký význam, zvláště pro vědeckou práci.

Maurská poesie v esperantu. Esperantské překlady z děl arabských básníků Hazm-Ibn-Jehva a Abulmaje přináší španělský orgán esperantský, vycházející v Jace.

Připravovatelé války jest titul 72stránkové esperantské brožury, jež byla vydána v Moskvě a byla odtud rozesílána, aby informovala cizinu o podrobnostech posledního procesu proti tak zvané Průmyslové straně. Použití esperanta umožnilo, že obsah spisu se stal známým ve všech zemích ihned po procesu.

Esperanto na pochodu v Japonsku. Japonský osvětový svaz Kiboša, čítající přes milion čle-

nů, vzal si za úkol šířit esperanto v japonských masách. K jednání o organizaci této práce byli přední činitelé tohoto svazu Gotoo a Išiguro v Evropě a nyní zahájili již ve svém domově široce založenou akci, jejímž účelem má býti vychování v době co nejkratší velký počet pracovníků pro další činnost.

Mezinárodní esperantské sídlo v Holandsku. Rada města Arnhemu dala mezinárodnímu ústavu esperantskému k bezplatnému užívání rozsáhlou moderní budovu se sadem. Ústav zahájil v Arnhemu na podzim svou činnost, a esperantské kursy, které tam uspořádal pod protektorátem města, měly značný úspěch. Aby práce ústavu byly usnadněny, byl mu dán nyní k dispozici dům, v němž se budou scházeti esperantisté ze všech zemí a budou konány stále mezinárodní kursy esperanta.

Esperantský ostrov. Bulharské město Rahovo darovalo místnímu esperantskému klubu ostrov na Dunaji v rozloze asi 200 hektarů, ležící na východ od města. Ostrov obdržel jméno „Esperanto“ a bude na něm zřízeno letoviště s rozsáhlou písčovou pláží. Bude tam též postavena velká železná věž s nápisem „Esperanto-lingvo internacia“, jež vzbudí zajisté pozornost lodí, plujících po Dunaji. Kolem ostrova jest stálý velký dopravní ruch.

Co čtou slepci. Pražská ústřední knihovna má velké oddělení spisů psaných vypouklým písmem slepeckým, Česky psaných svazků obsahuje úhrnem 1200, německých jen 290. Poměrně silně jest zastoupeno esperanto 120 knihami, Esperanto jest téměř jediným jazykem, jehož slepci různých národů používají k vzájemnému dorozumívání.

CEFAJ PRINCIPOJ DE LA HUMANECA ETIKO.

La IXa (fina) ĉapitro el la ĉeĥa verko de T. G. Masaryk „Idealoj de la humaneco“ esperantigita de H. K. Bouška.

(Fino)

La amo devas esti aĝema. Ni devas por la proksimulo ion fari, por li labori. Sed la laboro ne estas tiu maltrankvila, ekscitoplena serĉado kaj vagado; la laboro estu trankvila, cejkonscia. Hodiaŭ jam oni rekomendas la laboron multe kaj ĉie. Sed ekzistas ankaŭ laboro en neaĝemo. Mi rememoras la diron de Milton: „Kiu staras kaj atendas, tiuj ankaŭ servas.“ Atenti tion, kio okazos. La laboro ne estas idealo, ĝi ne estas fina celo. Ĝi estas rimedo. Ni ĉiuj, se ni estas sinceraj, volas havi liberan tempon. Sed tio estas grava, kiel oni uzas la liberan tempon. La laboro estas faroj malgrandaj, malagrablaj. Tio estas laboro, kiun neniu volas fari. Sed ni estas romantikuloj. En ĉiu estas sufiĉe da romantismo. Ni volas esti herooj kaj ni volas glorigi nin per grandaj aĝoj. Ago, sed ne laboro. Sed kiomaj estas tiuj generaloj kaj herooj kaj kiom da homoj sukcesos fari grandan agon? Ni ĉiuj volas esti gvidantoj. Estas sendube, ke la gvidantoj estas necesaj, sed gvidanto ne devas esti reganto. Bona gvidanto estos tiu, kiu scias servi kaj sentas, ke li mem estas gvidata kaj kiu volas esti gvidata. — Grandaj oferoj estas bezonaj iun fojon, sed malmultan fojon. Certe estas malmulte da homoj, kiuj havis okazon oferi sian vivon, sed tamen ni ĉiuj — en la fantazio — imagas situacion, en kiu ni konsentas oferi la vivon por la afero. Sed tio estas frazo, fantazio. La homaro, nacio, familio, partio, kamarado bezonas de ni laboron.

Ni ne serĉu plaĉon en la martireco. Ni ne serĉu plaĉon en la morto. Estas strange: la homoj volas vivi kaj ne scias sin fortiri de la morto. Do se ni volas la vivon, ni ne sopiru la martirecon. Se oni ĝis nun vokis: For la torturistojn! oni devas ankaŭ diri: For la martirojn! Ĝis kiam ekzistas torturistoj, ekzistas martiroj, sed ĝis kiam ekzistas martiroj, ekzistas ankaŭ torturistoj. Rememoru la simpatian Marianna'n en la

romano de Turgenjev „Novokampo“ (Novina), kiel ŝi volas oferi la vivon por Rusujo. Ŝi senĉese atendas ĝis venos la okazo, kiam la nacio diros: nun donu vian kapon! Sed tiu momento ne venis, kvankam ŝi senĉese ĝin atendis. Sed venis praktika homo Solomin, direktoro de fabrikejo, kaj tiu diris al ŝi, kio estas bezona: Rusujo ne atendas la oferon de vivo, sed al tiu malpura knabo purigu harojn, lavu malpuran vazon ktp., tio estas bezona.

Labori, tio signifas kontraŭstari la malbonon, kaj konsekvence kontraŭstari. Ĉie, ĉiam kaj precipe en ĝia ĝermo. Tio ne signifas esti radikala, sed persistema. Ne timi, mi dirus. El la timo la homoj faras perfortaĵojn, el la timo ili mensogas. Tirano kaj mensogulo timas, kaj sklavo estas ankaŭ tiu, kiu perfortas. Seneca diris: „Contemptor suaemet vitae dominus alienae“ (Malŝatanto pri sia vivo estas mastro de tiu de aliaj). Sed kompreneble, ni ne devas malbonuzi nian potencon — se la mondo volas esti trompata, ni ne devas ĝin trompi.

La amo ne estas sentimentaleco. Ni estas tro sentimentalaj, kaj la sentimentalismo estas egoismo. Ni amas karesi kiel la infanojn tiel la plenkreskulojn, sed ni ne havas imagon pri tiu konscia amo, pri kiu parolis Neruda.

Tia konscioplena amo devas diri ion, kio ĉe la unua aŭdo eble surprizos: Amu vin mem! Sed tio estas nenio mirinda, Kristo ankaŭ diris: Amu vian proksimulon kiel vin mem! Sed la homoj ne scias ami sin mem. Ruzeco kaj kalkulemo ne estas ankoraŭ sinamo. Amu vin mem kaj zorgu pri vi mem. Ne volu senĉese feliĉigi, faru sole vian devon.

Granda malbono estas, ke ni vivas en la penso, kion diros najbaro. Sed grave estas, havi sian konvinkon, sian individualecon. Ni kuraĝu esti niaj! Ni ne vivu por fremda konto, por fremda konscienco.

La moralo estas fondita sur la sento. Sed ne ĉiu sento estas vera, bela, kaj ĉar la moralo bazas sur la sento, tial ĝi ne kontraŭstaras la racion. Ni serĉu la kleron; ĝuste pro tio, ke la sento

estas blinda, ni devas al la sento lumigi per la racio. La kleron ni serĉu praktikan, sed ankaŭ ĝeneralan kaj filozofian. Hodiaŭ precipe estas ankaŭ necesa la klero historia, politika. La moralo hodiaŭ grandmezure signifas politikan moralon. Ni ne faru diferencon inter la politiko kaj la moralo.

Se ni volas kleron, ni estu atentemaj, ni lernu pensi, sed ni ne estu ĉionscivolemaj. Esti prudenta tio estas celo. Scii ĉion ne savos nin.

Ĝis kiom estas eble, ni devas kulturi ĉiujn niajn fortojn harmonie. Ne sole la animon, sed ankaŭ la korpon. Laŭeble harmonia klero.

Ni devas kredi la progreson, ke la vivo de la individuo kaj de la socio pliboniĝas, kaj ke estas ĉiam pli bone. Kiu kredas la progreson, tiu ne estos malpacienca. Progresi signifas venki la malbonon. Venki la malbonon per la bono — tio ne estas tro malfacila, sed malfacile estas, venkadi la bonon per la plibono.

De la naturo la homo estas malforta, sed elfunde li ne estas malbona. Tial en la kunlaboro de ĉiuj ni povas progresi.

La vera amo bazas sur la espero. Sur la espero pri la eterna vivo. Nur tia amo estas amo, ĉar la eterno ne povas esti indiferenta al tio, kio estas eterna. La eterno — la eterno ne komenciĝas nur post la morto, la eterno estas jam nun, en tiu ĉi, en ĉiu momento. Kaj tial prokrastu nenion por iu malproksima eterno.

Fiksante la rigardon al la eterno, ne malŝatu la materion, la korpon, kvazaŭ la spirito estus pli alta. La materio, la korpo ne estas sen valoro. Ne la materio nek la korpo estas fonto de la malbono, sed la spirito! La malpuro ne enestas en la materio, la korpo, sed ĝi devenas de la spirito.

Ne estu senagema, sed ne ekscitiĝu, ĉar vi estas eterna. Taksu ĉion ĝuste; kion vi ne finas, tion finas aliaj. Moderna homo estas sen ripozo kaj trankvilo. Kion vi ne faros hodiaŭ, vi faros morgaŭ, kaj se vi tute ne faros tion kaj se neniuj faros, tiam diru al vi, ke ankaŭ la dio zorgas pri tio, kion li kreis.

La espero pri la eterna vivo estas do bazo de la kredo de nia vivo. De la kredo, mi diras, ĉar sur la kredo estas fondita la vivo kaj la laboro. La skeptiko, la dubo, estas maltaŭga por la laboro. Sed nia kredo ne povas plu esti blinda, sed argumentita; ni povas sole havi kredon, kiu trairis fajron de la kritiko, do la konvinkon.

Jen eble la sumo de ĉio, kion mi rezultigis el diversaj etikaj sistemoj. Tio estas nenio nova. Se ni volas efektive solvi la sekretojn kaj taskojn de la vivo, ni ne devas atendi, dio scias, kiajn novajn rivelaciojn. Mi rememoras la riĉan junulon en Evangelio. De sia junaĝo li sekvas ĉiujn ordonojn de la dekalogo kaj li volas atingi la vivon eternan. Kristo al li konsilas, se li volas esti perfekta, li vendu, kion li havas, kaj sekvu lin: „Sed aŭdinte tiun diron, la junulo foriris malĝoja, ĉar li havis multajn posedaĵojn.“ Mi ĉiam pensis pri tio: ĉu li foriris malĝoja sole pro tio, ĉar li devis vendi sian havaĵon? Vid-eble li estis tute bona knabo, klera junulo vivanta laŭ la oficialaj moralo kaj religio, sed sentanta ilian nesufiĉon! Li iris do al la majstro por aŭdi ion tre novan, grandegan. Sed la majstro donas unu solan konsilon: amu la homojn!

Ni ne serĉu iajn misteroplenajn, supermezure profundajn kaj novajn formulojn kaj vastajn parolojn por ĉiuj enigmoj de la vivo. Enigmoj estas malnovaj kaj la respondoj al ili estas ankaŭ malnovaj. Kaj multaj tiuj respondoj estas bonaj kaj ĝustaj. Sed por vi ili estos ĝustaj, se vi mem komprenas ilian sencon kaj en la cirkonstancoj propraj al vi mem. Tiam multo, kion ni antaŭ longe aŭdis, havigas por ni novan sencon. Kaj tiel ni progresas, ke ni tion, kion ni jam konas, komprenas en nova lumo, ke ni aperigas ĉe malnovaĵo novajn flankojn. En tio montriĝas la profundo de la penso kaj kompreno, ke ni devas trovi ion en tio, kio estas longe konata, kion ni ĉiutage aŭdas, kion oni instruis al ni, kaj pri kio ni estis konvinkitaj, ke ni tiom jam tute bone komprenas.

EL CENTRA AFRIKO.

(Al nia artikolo en Progreso, nro 7—8.)

Verkinto de la artikolo sinjoro Williamson, jam antaŭ longega tempo informis nin, ke tie malproksime en centra Afriko, en proksimeco de montego Kilimanĝaro, li renkontis Ĉefojn! Ĉu tio ne mirigus anojn de nia nacio?

Por havigi al nia legantaro ideon, kie vivas tiu-ĉi nia korespondanto, ni represas ankoraŭ kelkajn linion el la letero, kiu ni grandparte jam represis.

„Ĉar mi estas plantisto, mi ne tro ofte renkontas Eŭropanojn. La plejproksima urbo estas Moŝi. Ĝi troviĝas en distanco de 50 mejloj de Ngare Nairobi, kaj ĝi havas — nur 50 loĝantojn. Du fojojn mi estis en Nairobi. (Kenjo.) Sed inter ĉi tie kaj tie estas 200 mejloj da dezerto kaj montoj. Tial mi ne ankoraŭ povis bone esplori la staton de viaj samnacionoj, kvankam mi bone scias, kaj ofte aŭdadas pri ties ekzisto en la regiono. Pacienciĝu do!

Depost mia lasta letero mi fariĝis delegito de UEA por ĉi tiu regiono. Mi ne atendas havi tre multajn vizitojn de esperantistoj pro la distancoj....! Sed kiu scias? Eble ĉi venos grandnombre. Nenio min jam mirigus ĉi tie.

Nun mi verkas tradukon de konata „Slo-silo“, en ĉi tiea lingvo Suahila. Kiam ĝi estos preta, mi sendos al Vi unu ekzempleron. Mia ĉefa malfacilo estas eltrovado de komercaj vortoj por tiu ĉi afrika lingvo. Kion scias tia Afrika nigro pri „akcioj“, „borsoj“ ktp.? Suahiloj ekzemple ankaŭ konas nur tri kolorojn: nigran, blankan kaj ruĝan. Kiel mi nun klarigu kaj traduku al ili vortojn. Flava, blua kaj aliaj?...”

Jarkolektoj VII.—XI. estas haveblaj ĉe ni por rabatita prezo Kĉ 14.— afrankite. Multa enhavo aktuala eĉ nun, La jarkolektoj I.—VII. kaj XII. estas tre malmultaj kaj estas vendataj por 20 Kĉ. Kompletigu viajn bibliotekojn!


POR KOMENCANTOJ


USONAJ SPRITAJOJ.

Patro sidis en brakseĝo, kiam lia fileto eniris kaj montris tranĉileton.

Patro, mi trovis tiun ĉi tranĉileton sur la pavimo!

Ĉu vi estas certa, ke iu perdis ĝin? demandis la patro.

Efektive, oni perdis ĝin! Mi vidis la viron, kiu serĉis ĝin, respondis la junulo.

Examiner (New York.)

La devo de ĉiu homo estas ĝuigi almenaŭ unu personon dum la semajno, diris la instruistino.

Ĉu vi tiel faris, Johanĉjo?

Jes, respondis Johanĉjo tuj.

Bonege! Kion vi faris?

Mi vizitis mian onklinon, kaj ŝi estis feliĉa kiam mi iris hejmen. Christian Register.

Tiu fraŭlino estas tenanto de rekordo!

Kio estas ŝia rekordo?

Ŝi estis savita dek-ok fojojn dum du semajnoj. Life.

Instruisto: „En via preĝo, vi petegas nur por via pano ĉiutage. Kial vi ne petegas provizon por tuta semajno?”

Joĉjo: „Por ke ni ricevu freŝan ĉiutage.

Pytloun.

El angla humoro.

— Diru al mi, Elinor, kiel vi estas kontenta en via edzeco kun artisto. — — Aĥ, ĝi estas fabela: Estas treege interese, kiam Egon pentras kaj mi kuŝas, ni poste serĉas diveni, kion la alia intencis fari. —

— Diru al mi, infanoj, kiu el vi volus iri en la ĉielon. — Ĉiuj infanoj levas la manon, sole Jakobo sidas senvive. — Sed, Jakobo, vi ne volas iri en la ĉielon? — Mi tre ŝatus, sinjoro instruisto, sed la panjo diris al mi, ke mi venu el la lernejo rekte hejmen.

Neniu ago fariĝas sen pago. Senpaga estas nur la morto, sed ĝi kostas la vivon.

Kara estas dono en minuto de bezono.

Ne gutas mielo el la ĉielo.

Ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu.

Prokrastita ne estas perdita.



BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333

NUMERO 32.

DECEMBRO 1930.

V. KOMITATA KUNVENO DE ĈAE

okazis la 17. Decembro 1930 en kafejo Louvre, Praha II., Národní 20. Ĉeestis: S-roj Brambora, Ginz, Hromada, S-ino Herziĝová, S-roj Janda, Dro Pitlík, Slavík kaj F-ino Tarantíková. Senkulpigis sin Dro Kamaryt, Dro Fousek kaj S-ro Skleněka. — Malfermo 20.45 horo. — Fino 0.30.

El la protokolo, kiu estis siatempo sendita al ĉiuj membroj de la komitato, ni eltiras la sekvantajn informojn.

Ekspozicio reĝiona en Louny.

La komitato de tiu ĉi ekspozicio demandas nin, ĉu esperantistoj volus aranĝi iun kunvenon en la tempo de tiu 1931. La komitato ne faris decidon, sed ekspozicio t. e. 14. Junio ĝis 31. Julio prezentas tiun ĉi sugeston al la samideanoj de tiu regiono.

Ĉefaj popolkutimoj, proverboj ktp.

S-ro Géza Berki, direktoro ĉe Landjuĝistaro, Del. de UEA, Debrecen, Kir Tábla, kolektas superstiĉojn, popolkutimojn kaj proverbojn por prilabori kaj komuniki ilin en naciaj kaj esp. gazetoj, eĉ en libroj. El nia lando li ĝis nun nenion ricevis. Laŭ lia deziro ni informas do niajn membrojn pri la entrepreno. La kunlaborantoj bonvolu skribi al S-ro Berki kaj okaze nin informi pri sia kunlaboro.

Invito al fremdlandaj propaĝandistoj Vojaĝo Scherer k. a.

Ĝis nun kluboj Olomouc, Přerov kaj Praha interesiĝas pri la paroladoj de S-ro Scherer. Pliaj aliĝoj estas atendataj. — Vojaĝo Sinha. Laŭ informo el Svedlando S-ro Sinha povus viziti nian landon nur aŭtune. — Ni aldonas, ke sub la impreso de la informo, ke S-ro Ĉe faris kursojn en Paris kaj en Berlin, la E. K. Praha antaŭnelonge debatis pri ebleco inviti S-ron Ĉe al simila entrepreno en Praha.

Rilatoj kun centraj institucioj.

Al UEA-bibliografia servo ni sendis ĉeflingvan lernolibron de volapük de V. Plocek el jaro 1880, kiu mankas en Bibliografio de Stojan; ni ricevis ĝin de la reĝo de profesoro Vlad. Jukl el Bratislava. — Al K. R. ni sendis Bultenon n-ro 30 kun markitaj lokoj, kiuj ĝin koncernas. — I. C. K. gratulis al urbestro de Bratislava pro nomigo de la Zamenhof-strato. — Kvankam ni informis K. R.-on pri pago de kotizoj jam 25. IX., ni ne ricevis ĝis 17. XII. ian ajn konfirmon pri nia letero kaj kalkulado. — Nia propono al ICK pri nuligo de la kongresa kotizo por reprezentantoj de la Naciaj Societoj ne estis akceptita. Kvankam ni ne plene rekonas la motivojn de rifuzo, ni cedas kun la propono, rezervante al si renovigi ĝin en alia tempo.

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien-

La muzeo (Wien I, Neue Burg, Heldenplatz) petas nin, ke ni aliĝu kiel dekjara membro kun kotizo 15 ŝilingoj aŭstriaĵ. Prokrastita. Laŭ informo de S-ro Steiner, ĝia prezidanto, povas aliĝi kun la sama kotizo grupoj por dek jaroj aŭ individuoj por la tuta vivo. I. E. M. petas ankaŭ, ke ni rekomendu al ĝi kandidatojn petotajn en ĝian Internacian Honoran Komitaton. Ĝis nun en Ĉeĥoslovakio akceptis tiun funkcion industriisto Dro Inĝ. Mühlig el Teplice. Same ĝi petas pri kandidatoj en Internacian Kuratoran Komitaton. Nia prezidanto informis ĝin pri kelkaj nomoj kaj rekomendis al ĝi trakti kun la koncernuloj senpere.

Leteroj.

Ni gratulis al nia komitata kolego S-ro Antonín Kudela en Olomouc okaze de lia 60-a naskiĝtago (21. XI. 1930). — Ni kondolencis al S-ro Em. Kubásek en Plzeň pro morto de lia edzino, konata esperantistino.

Propagando en Brno.

Al samideanoj de Brno ni sendis laŭ la adreso de nia komitatano S-ro Vondroušek senpage 200 ekz. de la propagandilo „Pojičko“ por disdoni al la ne-esperantista publiko dum la kunveno la 11. XII. 1930.

Helpo al instruistoj de esperanto.

ĈAE rezervis siatempe certan sumon por parte kompensi al la kandidatoj sukcesintaj ĉe la ekzamenaj komisionoj precipe la vojaĝajn elspezojn. Laŭ peto de S-ro Ladislav Czibur el Revúca, kiu faris la ekzamenon en Bratislava kun eminenta sukceso (v. p. 84) ni kompensas al li Kĉ 146.20. — Estos starigita statuto de tiu ĉi monrezervo.

Literatura Sekcio de ĈAE.

Asocio intencas revivigi la iaman Literaturan sekcion, kiu 1) registros tradukojn el la ĉeĥa literaturo jam publikigitajn aŭ nur en manuskripto 2) informos tradukantojn demandantajn pri taŭga materialo, 3) instigos por preparo de Ĉeĥoslovaka Antologio, 4) zorgos pri kompletigo de la Bibliografio de Stojan. Ni alvokas al niaj membroj anonci sin por kunlaborado.

Esperanto en Radio-Praha.

La de ni deziratan duonhoran vesperon de Zamenhof ne plu estis eble envicigi en la jam pretan programon. Sed Radiojournal almenaŭ rezervis al ni 10 minutojn la 23. XII. 1930 (15.50—16.00 h.), dum kiuj S-ro Ginz, nia sekretario, parolis pri Zamenhof kaj lia verko (ĉeĥe).

Afero Biske.

Laŭ deziro de nia vicprezidanto D-ro Pitlík en la 11. alineo de la protokolo pri la IV. komitata kunveno la lasta frazo devas teksti korekte jene: „...ke la samon li deklaris al la redakcio de Polední list estinte tiurilate telefone demandita.“ — S-ino Biske pasigis certan tempon en la malliberejo Praha-Pankrác. Post kiam la esplora juĝisto enketis multajn atestantojn, S-ino Biske estis ree transportita al la tribunalo de Kutná Hora.

2. Membra kunveno de ĈAE.

Ĝi okazis la 28. XI. 1930 en la ejo de E. K. Praha afable disponigita al ni de la klubo. Ĉeestis ĉ. 50 personoj. Parolis D-ro Pitlík, kiel vicprez. S-ro Hromada, kiel ĝenerala sekretario kaj S-ro Ginz kiel I. sekretario, pri la movado internacia, enlanda kaj pri agado de ĈAE. La membroj kaj ĉeestintaj gastoj atente aŭskultis la raportojn. Poste neloga debato.

Silezia Ligo.

Laŭ informo de S-ro Sklenčka estis fondita nova organizaĵo esperantista Silezia Ligo en Orlová. Oficialan sciigon de la prepara komitato ni ne ricevis. La komitato atentigas la samideanojn de Silezio, ke pli sukcese ili povus labori ne apartigante sin de la cetera esperantistaro. La fondo de tia ligo praktike signifas por ni neeblon varbi membrojn en Silezio, ĉar se nun multaj rifuzas pagi 16 Kĉ por la movado, ili ne volos ĝin pagi krom la ligo kotizo 6 Kĉ kaj krom la kotizo klubo.

Malgraŭ tiuj konsideroj ni deziras al la sileziaj laborantoj, ke ili havu plenan sukceson kaj ni esperas, ke ili informos nin de tempo al tempo pri siaj sukcesoj.

Dise aŭ kune?

Samideano en Praha informis nin, ke li sendis al la urbestro de Praha peton nomigi straton de Zamenhof kaj placon de Esperanto. La komitato opinias rekomendinda, ke tiajn entreprenojn, kiuj ne havas karakteron de afero privata, sed ĝenerale grava, ne faru privatuloj direkte, sed pere de lokaj kluboj — se temas pri afero de loka signifo — aŭ pere de Asocio — se la entrepreno havas signifon tutrespublikan. Tiu ĉi principo bazas ne tiom sur prestiĝo de Asocio aŭ de kluboj, kiom sur la motivita timo, ke nia movado ne estu rigardata de la aŭtoritatoj kiel anarkia, senorganiza areto da fantaziuloj, sed kiel dignoplena movado gvidata de organiza solidareco. La Asocio kompreneble klopodos savi el tiu privata entrepreno, kio estas savebla.

Libro pri Baĉa en esperanto.

S-ro Jan Poláček en Břeclav tradukis libron de Cekota: Baĉa, myšlenky, činy, život, práce. La aŭtoro permesus la tradukon kaj pruntus fotojn (kliŝigotajn) por 1000 Kč. Baĉa mem rifuzis eldoni la libron en esperanto. La tradukinto demandas, ĉu Asocio eldonus. — Ne aprobata pro principaj kaŭzoj klare videblaj.

Esperanto en lernejoj.

La ministerio de instruado informis nin, ke nia propono fariĝis objekto de la oficiala traktado. — Petskribojn sendis ankoraŭ E. K. Nové Zámky kaj Bakov.

Honora Komitato de ĈAE.

Decidite informi regule la membrojn de la H. K. per monata alsendado de raportoj pri la vivo kaj marŝo de la movado.

Gazetara servo.

Ĝis nun la materialo por gazetoj kaj ankaŭ la akompana letero al la kunlaborantoj estis redaktitaj en la ĉeĥa lingvo. De nun la akompana letero estos skribita en esperanto. Redakti en esperanto ankaŭ la materialon por la nacilingvaj gazetoj, kie! deziris samideanoj en Nové Zámky kaj Užhorod, la komitato ne trovas praktika, ĉar ni ne povas trudi al 90% da kunlaborantoj senbezonan laboron de tradukado el esp-o en nacian lingvon; nun ili povas simple distondi aŭ reskribi la pretajn informojn.

Aliaj punktoj priparolitaj.

Informo pri Liechtenstein de ni dissendita aperis en 49 gazetoj de nia lando. La koncernaj gazetoj aŭ almenaŭ eltranĉaĵoj estos senditaj al ICK, kiu kolektas tiun materialon por prezenti ĝin en Vaduz. —

Pri la komuna kunveno kun GEL ni ne povas doni precizan daton ĉar ĝis nun GEL ne respondis nian leteron de 8. Novembro 1930. R. H.

AGADO DE ĈAE EN 1929.*)

Laŭ la raporto de la ĝen. sekr. en la jara kunveno de ĈAE la 13 Aprilo 1930.

Divido de la funkcioj: En la unua komitata kunveno la 21. 3. 1929 estis elektitaj: S-ro Eiselt kiel prezidanto; D-ro Kamaryt kiel VP.; Hromada ĝen. sekr.; Bloch I. sekr.; S-ino Herzigová kiel II. sekr. La ceteraj membroj restis sen funkcio. La protokolojn prizorgis F-ino Tarantíková.

Al ĉiuj membroj de la komitato kaj de la kontrola komisiono estis senditaj leteroj informaj kun la peto, ke ĉiu konfirmu sur la almetita formulo akcepton de la funkcio.

En julio 1929 rezignis S-ro Vašíček, Ŭstí n. O.

En oktobra komitata kunveno estis sciigite, ke S-ro Slavík rezignis kiel kasisto. En februaro 1930 S-ro Eiselt sciigis, ke li rezignas kiel prezidanto, eliras el la komitato kaj ne deziras esti reelektita.

La unuaj kunvenoj komitataj okupis sin per la programpunktoj, kiujn la ĝenerala kunveno transdonis. Oni debatis aŭ sendebate aŭskultis pri la jeno:

aranĝi propaĝandan semajnon fine de septembro aŭ komence de oktobro, kune kun GEL, per helpo de samtipa bilda afiŝo. Ne okazis.

kolektado de subskriboj de la gepatroj por peticio postulanta enkondukon de espo en la lernejojn de ĈSR kune kun GEL.

Ne farita, ĉar internacie neefektivebla sekve de nekonsento de instruistaj organizaĵoj internaciaj (esp.);

varbado de la membroj kaj revarbado de la estintaj membroj: estis preparitaj adresoj de tiuj personoj, sed la tuta afero restis en stato de preparo.

por helpi al la varbado la komitato intencis krei aranĝon de t. n. lokaj reprezentantoj de ĈAE, kiuj ludus similan rolon kiel delegitoj de UEA koncerne la varbadon de la membroj, kreadon de lokaj grupoj, loka gazetara propaĝando k. s.,

kunvenoj de la estraroj de ĈAE kaj GEL estis afero rekomendita de la kongreso de Teplice. Komence ĝi estis planita por septembro, poste por novembro, sed estis prokrastita,

junulara sekcio. Ni petis s-ron Novák jun ke li gvidu la sekcion ankoraŭ en la nuna jaro.

*) Por ne interrompi la sinsekvon de la jar-raportoj kaj por plenu mi la promeson donitan en antaŭa n-ro, ni publikigas, kvankam malfrue, tiun ĉi raporton pri 1929. Multaj ĝiaj punktoj estas ankoraŭ nun aktualaj,

Li akceptis kaj prezentas sian raporton pri sia agado.

ŝtate ekzamenitaj instruistoj de espo. La lasta ĝen. kunveno deziris, ke la komitato entreprenu ĉion por ke

1. jam ekzamenitaj efektive instruu,

2. ke aliaj instruistoj faru la ekzamenon kaj instruu. La ĝen. kunveno deziris ankaŭ, ke ni klopodu, ke ekzistu ia helpa libro por kandidatoj, ĉar ne por ĉiu estas eble havigi al si la necesan studan materialon. Estis esprimita opinio, ke la komisaroj ekzamenaj mem devus verki tian libron. La afero ne eliris el stadio de deziresprimado.

Proponon de F-ino Šupichová pri starigo de **informa oficejo** traktis la komitato en majo. La ideo estas, ke en iu kafejo aŭ restoracio de Praha deĵoru ĉiutage dum certaj horoj esperantisto, kiu estus preta doni informojn al la venantaj demandantoj. En la kunveno estis dirite, ke jam nun kunvenas en Odborový dům E. Klubo, ke ankaŭ la Verda Stelo havas tie sian ejon, ke S-ro Bloch preskaŭ ĉiutage estas en Odborový dům, kaj ke do oni traktos kun aliaj kluboj pri starigo de tia servo en Odborový dům.

Propono de F-ino Šupichová kaj de S-ro Jandik pri havigo de **pagita sekretario**. La propono estis malakceptita kun motivo, ke mankas mono.

Al la ministerio de instruado estis sendita letero (al ĉiu departemento aparta letero), en kiu ni petas, ke dum la preparata lerneja reformo oni trovu lokon por esperanto.

Samtempe, same laŭ instigo de nia VP, D-ro Kamaryt, ni skribis al la **politikaj kluboj** de la deputitoj. Venis respondo de naci-socialistoj („ni transdonis al la koncerna raportanto de nia klubo por informo kaj plua traktado“) — Naciaj-demokratoj: „Via letero estos traktata en unu el la plej proksimaj kunvenoj klubaj“ — Agraroj: La sekretario intervenis en tiu afero ĉe la ministerio de l'instruado — Social-demokratoj: „Via leteron ni transdonis al nia kultura komisiono. Laŭ ĝia ekspertizo ni agos.“

Propono pri reorganizo de la Asocio: (Jandik.) ĈAE fariĝu centro de ĉiuj kluboj ĉs. La kluboj havu siajn delegitojn en la komitato Asocia. Ĉiu membro kluba pagos krom kluba kotizo ankoraŭ 8 Kĉ al kluba kasisto por ĈAE kaj fariĝas tiel aŭtomate membro de ĈAE. Ekz. kluba kotizo estos 24 Kĉ, el kiuj 8 Kĉ iros al ĈAE. Estis dissenditaj 60 leteroj al kluboj ĉefaj (en junio 1929). Ĝis hodiaŭ venis 9 respondoj.

Košice kaj Ústí n. O. konsentas, ili jam nun pagas po ĉiu sia membro 16 Kĉ.

Pardubice: principe konsentas pri la nova organiza formo, sed ne donas detalan respondon.

Sdružení přátel esperanta Praha atentigas, ke ili ne estas klubo en la senco de la leĝo.

Prostějov: ne, ilia kotizo estas 5 Kĉ jare, iliaj membroj ne povus pagi 13 Kĉ jare. Plendas pri neapero de Progreso.

Kolín: en ĉiuj punktoj jes.

Přerov: Niaj membroj pagas 10 Kĉ, kontraŭstaras ĉiun altigon. Definitiva respondo pli poste. Ne venis.

Milevsko: Aligos 10 membrojn, ĉar estas nova ordo en Asocio.

Hora Kutná: Preta eniri en la Asocion, sed por kotizo 1 Kĉ por ĉiu membro. Aŭ ili pagus kiel tuto 16 Kĉ kiel unu membro kun rajto partopreni la ĝeneralan kunvenon per unu delegito kaj kun devo aboni 1 ekz. de La Progreso.

Al la demando, ĉu klubo sentos sin ligata per decido de la plimulto de la kluboj, t. e. ĉu Hora Kutná akceptos la novan aranĝon, se la plimulto de la kluboj akceptos ĝin, la klubo respondas nee, precipe se temus pri financa ŝarĝo, ĉar en diversaj urboj estas diversaj situacioj. Ĝisnuna kotizo kluba 6 Kĉ.

Tiu ĉi provo do malsukcesis, kion cetere antaŭvidis homoj, kiuj pli longe vivas en la movado kaj konas la mentalecon de niaj esperantistoj. Estas interese, ke el 60 kluboj sole 9 trovis inda respondi al la Centro, malgraŭ ankoraŭ unufoja atentigo.

Tamen la afero de plipotencigo de la Asocio estas tiel grava, ke la kunveno devus esplori, ĉu ni ree provu solvon laŭ tiu ĉi maniero aŭ ĉu ni prefere sin aranĝu laŭ la maniero de UEA, t. e. kreu sistemon de lokaj reprezentantoj aŭ korespondantoj, ĉefe dŭvĕrníkŭ.

En maja kunveno S-ro Bloch proponis, ke okazu almenaŭ du **membraĵ kunvenoj de ĈAE** anoj dum la jaro. Laŭ la protokolo la debato ne estis finita kaj tiu afero neniam estis reprenita.

Tamen estus tre utile, se tiaj kunvenoj okazus, ne nur en Praha, sed en diversaj lokoj de la respubliko, bone preparitaj per antaŭa korespondo, akompanataj de diversaj aranĝoj, kiuj prezentus allogilon precipe por izolaj esperantistoj.

En junia kunveno la komitato akceptis la proponon de S-ro Bloch sendi al la ministerio de poŝtoj peton, ke la **respondkuponoj** estu eldonitaj ankaŭ en esperanto.

Respondo de la ministerio ĝis nun ne venis.

La Kongreson en Budapeŝt partoprenis nia Asocio per sia delegito S-ro Bloch, subvenciita per 1000 Kĉ. Pri lia partopreno en la kunsidoj de la Reprezentantoj de la Naciaj Societoj mi ne trovas raporton en la protokoloj. S-ro Bloch mem verŝajne donos la raporton al la ĝenerala kunveno.

En la nuna jaro estis aranĝota V. ĉs. kongreso. Invito venis el Espo-Societo Olomouc, kies delegito S-ro Kudela speciale venis al Praha kaj raportis en la kunveno de la 2. Novembro 1929 pri la preparoj jam faritaj kaj prezentis la kondiĉojn de Olomouc, kiuj estis akceptitaj, de ni kaj de GEL. Estas ĝenerale konate, ke Olomouc revokis la inviton, timante ke la kongreso ne estus konvene vizitita, sekve de la samtempa kongreso en Dresden.

Poste venis invito de la LKK en Dresden, ke ni partoprenu ilian kongreson. La amikajn rilatojn de la ĉs. espistoj kun la germanaj tre subtenus, se nia Asocio oficiale aranĝus karavanon al Dresden.

Eldona agado. Asocio eldonis pliajn 5000 ekz. de Pojtko por cca 300 Kĉ.

Ŝlosilo. Asocio eldonis 3000 ekz. de Slovaka Ŝlosilo. Posedanto de la eldonrajto de la t. n. ŝlosiloj de Ĉefeĉ estas Internacia Centra komitato en Geneve, kiu per kontrakto de la 15. Aprilo 1929 ĝin senpage cedis al ĈAE kaj eĉ konsentis doni subvencion de 100 sv. fr. (650 Kĉ). Kiel solan kompenson ni devis doni kaj donis 300 senpagajn ekz. por propaganda celo de ICK. Por certigi konservadon de la enhavo de la ŝlosilo, ni devigis nin fabrikigi kartonmatricojn por stereotipo. La kontrakto koncernas la unuan eldonon (3000 ekz.), sed povas esti renovigita per simpla deklaro. La eldono kostis Kĉ 2.142.—.

Tiu ĉi ŝlosila afero estas ekzemplo, kiel eĉ niaj eksterprahaj komitatanoj povas sukcese kaj efike labori. D-ro Kamaryt donis iniciaton, preparis ĉion, prezentis por aprobo, verkis la slovakajn tekstojn, traktis kun la presejo, dissendis ofertojn, havigis preskaŭ 1000 Kĉ jam antaŭ la preso, unuvorte faris ĉion. Estu menciite, ke li ne faris tion sub nomo sia, por sia persona gloro, sed tiun ĉi gravan helpon al nia movado en Slovakio li senhezite faris sub nomo de nia Asocio kaj por ĝia t. n. gloro.

Kian helpon li trovis en Praha? Post apero li proponis ke po unu ekz. estu sendita al adresoj de konataj laborantoj, kun aldono de

pagilo. La komitato akceptis kun kondiĉo, ke troviĝos iu, kiu volus fari tiun teruregan laboron dissendi 50, ni diru 100 ŝlosilojn.(!)

Bulteno. Sekve de tio, ke La Progreso ne estis aperanta, la komitato decidis eldonadi memstaran Bultenon, sendepende de la Progreso sub redakto de Inĝ. Berger en Dymokury. En julio aperis unua n-ro, en oktobro la dua. La tria, pri kiu oni parolis en la kunveno de 17. 12. ne aperis.

Laŭ formala vidpunkto iuj membroj plendis, ke la komitato ne rajtis ŝanĝi la decidon de la ĝenerala kunveno (en Pardubice). La prezidanto deklaris, ke la komitato devis sin aranĝi, ĉar Progreso ne aperadis. Aliaj plendoj estis pro la enhavo mem. Eĉ ne protokoloj pri la kunvenoj aperis en la nova Bulteno.

Tial la kunveno decembra decidis, ke la januara n-ro de la Bulteno aperu ree kun la Progreso, event. ankaŭ la dua. Pri la plua procedo devas decidi la hodiaŭa kunveno.

UEA. En sia kunveno de la 3. Oktobro la komitato decidis protesti ĉe UEA kontraŭ uzado de germanaj nomoj en la Jarlibro.

UEA respondis per sia letero de decembro, ke ĝi uzos nur la ĉefajn nomojn, laŭ deziro, sed ke ĝia komisiono decidis, ĉu jam por 1930 oni faru la ŝanĝon aŭ nur por la jaro venonta.

Intertempe la situacio ŝanĝiĝis, UEA havigis al si dokumentojn, laŭ kiuj estas videble, ke oni toleras kaj uzas, eĉ oficiale, ankaŭ la germanajn nomojn kaj sendis al ni leteron, de la 10. Aprilo, ke ĝi restos ĉe la malnova sistemo.

Jen la ĉefaj trajtoj de la agado de la nunjara komitato. La raporto estas treege konciza kaj eble nekompleta, kaj tre diferencas de miaj raportoj dum la antaŭaj 9 jaroj.

Kaŭzo? Mi ĉesis esti plene informita ĝenerala sekretario, ĉar en tiu ĉi jaro mi ne plu ricevadis ĉiun poŝton, nek alvenantan, nek elirantan. De junio oni komencis uzi adresojn de la unua sekretario kiel adreson de Asocio, spite miaj averto kaj malkonsilo.

La unua sekretario certe en sia raporto informos vin ankaŭ pri tio, kio eble mankas en la mia.

Rud. Hromada.

*Jsou všichni čtenáři
též členy ČAE. na rok 1931 ?*

POKLADNÍ ZPRÁVA ZA ROK 1929.

Aktiva:	
Hotovost	300,84
Vklad pošt. úř. šek.	587,41
Vklad ve spořitelně	3252,70
Zásoba věcí prodejných	471,52
Inventář	796,50
Pohledávky	3.978,—
	<u>9.386,97</u>

Pasiva:	
Dluh E. K. Praha, ICK	182,—
Jmění	9.204,97
	<u>9.386,97</u>

Účet ztráty a zisku

Správní výlohy:	
Pošt. úř. šek.	103,30
Poštovné	565,70
Kancelářské potřeby	107,60
Cestovné	410,—
Valná hromada	420,—
Tiskopisy, pozvánky, legítimace	299,85
Členské premie	115,—
Buřteno	628,—
	<u>2.649,45</u>

Propagační výlohy:	
Pošt. věd. sek., přílohy	117,25
Výstřížková kancelář	210,—
5000 pojítka	296,15
Postkongreso	100,—
Slovenský klíč	419,80
	<u>1.143,20</u>

Inventář:	
10% odpis	88,50
Různé:	
Kongres Budapest	1.000,—
Přebytek za r. 1929	544,58
	<u>5.425,73</u>

Příspěvky: 1927	32,—	
1928	382,—	
1929	4.390,—	4.804,—
Správ. výlohy: náhr. porta		8,10
Prodejné věci: zisk		52,09
Propag. výlohy: náhr.		16,—
Různé:		
I. C. K.	325,—	
Úrok p. ú. š.	4,85	
Úrok v spořitelně	206,49	
Rakovník	29,20	565,54
		<u>5.425,73</u>

Účet základní.

1. I. 1929: Jmění	8.660,39
Přebytek 1929	544,58
31. XI 1929 jmění	<u>9.204,97</u>

Ĉeĥoslovaka gazetaro pri esperanto.

Právo Lidu de 2. 12. 1930 kaj
Národní Politika de 4. 12. 1930 alportis longan informon pri la esperanta eldono de la Andrée-libro. Aldonita estis alineo pri Andréo el verko „Aerŝipe al norda poluso“, kun mencio, ke ĝi estis tradukita ĉeflingven laŭ esperanta manuskripto.

Rozkvět, ilustrita semajna revuo, Praha, alportis el - kaj priesperantan artikolon pri vizito ĉe la filmisto Laemmle kun bildo de li kaj de sro Scherer. Tiu revuo publikigis ankaŭ novelon de la estona verkisto Friedeberg Tuĝlas, ĉefigitan de sro O. Ginz laŭ esperanta traduko. Ni ne sukcesis ekscii, ĉu la estonaj samideanoj interesiĝas pri ĉi tiaj pruvoj de internacia kunlaboro.

Deutsche Taubstummen-Propaganda, germana gazeto de surdmutuloj, aperanta en Litoměřice, skribas en sia nro 9-1930 evidente serioze pri la simplega solvo de la internacilingva problemo. Laŭ D. T. P. ne estas necesa la nove inventita esperanto, ĉar sufiĉas ja por la interkompreniĝo la ĝesta lingvo de la surdmutuloj. — Jen la ovo de Kolumbo! Kia ĝuo la venontaj internaciaj kongresoj. Ne sole perfekta interkompreno, sed kia silento ĉiam!

Alian opinion havas iu bruselano. Pri tio ni legas en Moravský přítel lidu, Brno la 25. 11. 1930. Estas lingvoinstruisto sro d' Harvé. Ankaŭ li ne estas kontenta pri esperanto. Tamen ne en la manumado li vidas la savon, sed en sia fabrikaĵo La Panlingha Romanangle. Ni ne scias, ĉu estas opinio de la aŭtoro aŭ de la raportanta gazeto, sed ni legas, ke oni lernos tiun novan internacian lingvon dum 8 tagoj... se oni scias itale, hispane, latine, france, angle kaj flandre. Pro iuj vere interesaj reguloj pri la vortokreo la ĵurnalo komparas la novan lingvon al la idiomo de insulanoj en la Pacifiko.

O. G.

Preseraro. En artikoleto Esp-o gazetoj en Ĉ. sur p. 83 linio 21 legu ĝuste 1. IV. 1930.

Mencio pri esperanto en la scienca verko de Dr. S. St. Osuský, profesoro de la Teologia ev. fakultato en Bratislava, Enkonduko en sociologion (Úvod do sociologie, Praha Štátné nakladatelstvo, 1930. I. a II. část) estas en la ĉapitro „La lingvo“ sur paĝo 100. de la unua parto. La senco de la mencio estas simpatia por nia movado, sed skeptika pri fina rezultato.

MOVADO EN ĈEĤOSLOVAKIO

POLICISTOJ.

Praha. En policista lernejo instruas S-ro dir. Řádek, Enskribiĝis 50 (6 foriris pro malsano), restis ĝis la fino 44 policistoj. La aliĝo al la kurso estis libervola, sed post la aliĝo deviga. La kurso konsistas el 40 lecionoj.

LABORISTA.

Laborista klubo de esperantistoj en Praha prezentis sin al publiko per du sukcesaj programaj kunvenoj, kiuj de novembro okazos ĉiun unuan mardon en monato en Odborový dům (Perštýn 11) je la 20a horo. Unua kunveno, okazinta la 4an de novembro havis jenan programon: prelego de F. Staněk pri esperanto kaj proletaro, kiun sekvis diskutado. — K-do Fox prelegis pri historio de laborista esp. movado kaj F. Staněk prezentis tradukon de ĉeĥa literaturaĵo de Rikin, Kunvenis 37 personoj.

La dua kunveno okazis la 2an de decembro kaj havis jenan programon: pianludo de filo de k-do Petr, prelego de s-ro Šidlo pri esperantismo kaj laboristo, post kiu estis en debato difinita la rilato inter esp. kaj socialismo. K-do Petr prezentis koncerton de saksofono kaj F. Staněk raportis pri aktualaĵoj en laborista movado kaj en esperantujo ĝenerale. Partoprenis 42 personoj. — Multaj diskutis. La elementan kurson de la klubo partoprenas 16 lernantoj. Oni invitas ĉiujn partopreni en la kunvenoj.

f. st.

Praha. Esperantista rondo ekzistanta jam dum tri jaroj en la Masaryka studenta internato en Dejvice aranĝis 2. 12. 1930 prelegon de dro Pitlík pri „ideo de internacia lingvo“. La prelegon sekvis vigla kaj atentinda diskuto.

Pisek. Esp. Klubo aranĝis la 11. Decembro amikan vesperon je la honoro de D-ro Zamenhof, en rest. de Obecni dům.

Brno. Klubo de katolikaj esp-istoj aranĝis kurson por abiturientoj de la ĉeĥoslovaka industria lernejo (40 kursanoj) kaj por la amikaro de lernantoj (Učednická besídka Řemesnické besedy Svatopluk) kun 25 partoprenantoj. En novembro 1930 fondiĝis el membroj de la klubo Kantista rondo gvidata de pastro Alois Kratochvíl. Kunvenoj ĉiun jaŭdon en klubejo Koliště 5.

Brno. Esp. Klubo aranĝis amikan vesperon la 11. Dec. 1930, dank al valora helpo de Ges-oj Strejček, S-ro polica inspektoro Drlik, Partoprenis ĉ. 150 personoj. Malfermis kaj salutojn de ĈAE transdonis S-ro Vondroušek, komitatano de ĈAE. Esp. kaj ĉefe parolis S-ro Jiří Šamla, kantis S-ino Nečasová, deklamis Blaženka Baďurová, filineto de polica inspektoro, S-ro Šamla violonludis. Horo de Katolika esp. Klubo kantis. Polic. Gryndler (en uniformo kun ŝildeto „Esperanto“) deklamis poemon „La policano“. Post paŭzo sekvis unuakta komedio „Letero de malfidela edzino“. Ĉio finis per danco. Humoro tre bona, same la financa rezulto.

Bratislava. Esperanto-Klubo havis la 9. novembro 1930 la unuan ĝeneralan kunvenon en sia nova klubejo, strato Vydrice 16. — **Ŝanĝo en estraro:** Vicprezidanto Jukl, prokuroro Dr. Kamaryt, sekretario Rosa, protokolisto Simboch. — La 14. de decembro 1930 la klubo aranĝis memorfeston de Zamenhof kaj tagon de libro kun libro-ekspozicio. S-ro Wanišek en sia parolo pritraktis homaranismon de Zamenhof kaj internan ideon de Esperanto. S-ro Jukl parolante pri la tago de la libro instigis ĉeestantojn, ke ili ne nur legu, sed ankaŭ aĉetu la librojn por helpi disvastigon de nia literaturo. — Poste estis aranĝita sukcesa libro-loterio, kiu vekis grandan intereson. — Depost komenco de decembro okazas en la klubejo ĉiun dimanĉon posttagmeze amuzkunvenoj (kvinahora-teo), tre ŝataj de ĉiuj gesamideanoj.

V. J.

Nové Zámky. Esperanta Rondo Amika aranĝis la 14. Decembro 1930 Zamenhofan solenon. Festan paroladon pri Z. havis S-ro Csáder el Bratislava, deklamis La Vojo S-ino Bujáková, la unuan paroladon kongresan interpretis S-ro J. Becska, plie kantis kvarteto de la klubo, deklamis F-ino A. Farkas, slovakajn kantojn en espo prezentis S-ro Bujarek, anekdotojn el Esperantujo S-ro Peczár.

Nové Zámky. En tiu plej suda parto de respubliko — dank al klopodemaj samideanoj — nia movado revigliĝis. En la urba popollernejo estas kurso gvidata kun 30 ĝelernantoj hungarlingve, Slovaklingva esperanto-kurso nunjare ne estis aranĝebla pro la manko de kursgvidanto. S-ro Peczár la nuna kursgvidanto diligente laboras, kaj meritas la laŭdon. Por alvoki la instruistaron je nia afero la rondo decidis 33⁰⁰-on el la kursa enspezo doni al la ĉiamaj gvidantoj de kursoj. La kinoj konstante kaj senpage projekcias esperanto-diapozitivon.

V. Bn.

Japanaj esperantistoj en Nové Zámky.

En novembro 1930 s-ro Taky Rintaro konata japana fabrikisto kaj esperantisto vizitis Eŭropon kune kun sia edzino, kaj dumvojaĝe haltis en Nové-Zámky, kie ili jam delonge havas korespondanton. Ĉe la vagonaro estis bela akcepto. La gastoj hazarde venis la tagon, kiam estis malfermita la kurso, kaj ilia apero faris grandan propaĝandon kaj allogis multajn adeptojn al la kurso. S-ro Taky faris interesan prezentadon pri la bela oriento, kaj kun sia ĉarma juna edzino estis ĉie ĝoje akceptata. En la tuta urbo oni parolis pri la japanaj gastoj, kiuj alitage kun tre belaj rememoroj forlasis la urbon por vojaĝi al granda „Baťa“—fabrikejo. Al Baťa ili eĉ per esperanto-telegrafo anoncis la alvenon.

V. Bn.

Jara kunveno de E. R. A. en Nové Zámky.

La 30. 11. 1930 okazis la ĝenerala kunveno de E.R.A. kun partopreno de ĉiuj esperantistoj el la urbo. La kunvenon prezidis s-ro Bujarek. S-ro Badin la sekretario longe raportis la pasintajn okazintaĵojn, el inter kiuj estas nindaj: la nomigo de Zamenhof-strato en la urbomezo, kaj la vizito de esperantista vagonaro postkongresa, kiam la stacidomo estis ornamita per flagoj kaj la esperantistojn bonvenigis muzikistaro, kaj aro da sam-kaj alilokaj samideanoj. La rondo aranĝis lastan jaron du kursojn vizititajn de 50 partoprenantoj. Aranĝis oftan ekskurson inter kiuj eĉ instruajn al la apuda ŝtata observatorio kaj sukerfabrikejo. La kasisto raportis la staton de la kaso en kiu estas kontanta mono Kĉ 1000.—, en banklibro 1400.—, en libroj por forvendo Kĉ cca 2000.— Kĉ. Post la raporto de funkciuloj prezidanto abdikis en la nomo de estraro. La kunveno elektis kiel aĝestron s-ron Weinstein kiu alvokis la kunvenon por nova elekto. Post la paŭzo estis laŭlegita la rezulto de la balotoj. Estro: s-ro Viktor Badin, subestro: s-ro Vilhelmo Bujarek, sekretario: f-ino Julino Farkas, kasisto: s-ro Karlo Peczár, libraristo: s-ro Josefo Becska. En la komitato estis elektitaj: s-ro Weinstein A., s-ino Štrbová, s-ro Badin Julio, f-ino Farkas Agneto, s-roj Politzer kaj Geiringer. Protokolisto s-ro Farkas M.

V. Bn.

Ĉu Vi partoprenas la radio esperantokurson senditan el radio-stacio Bratislava de s-ro Emilo Wanitsek, Skribu al sendstacio por propaĝandi kaj konvinki pri la uzebleco de internacia lingvo!!

GAZETARA EKSPozICIO EN ZAGREB.

ĈAE laŭ peto de la Unuiĝo de jugoslavaj grafikistoj instigis eldonejojn de ĉiuj gravaj ĵurnaloj ĉeĥoslovakaj, ke ili sendu siajn gazetojn por la Gazetara ekspozicio aranĝata de la nomita unuiĝo en Zagreb. La rezulto estis bona kaj ĈAE ricevis dankan leteron dirantan i. a.: Vi donis multe, vi donis ŝtonegon al nia sukceso. Plej multe da gazetoj ni havis el Ĉeĥoslovakujo kaj via pavilono estis la unua. Ĉeĥoslovaka konsulo en Zagreb ĝin kun admiro rigardis. Ĝi portis la surskribon: Tutan gazetaron ni ricevis per helpo de ĉeĥoslovakaj esperantistoj. — Denove nian koran dankon por granda helpo en granda laboro.

Gekolegaj instruistaj!

Mi turnas min al ĉiuj, kiuj ŝatas nian „Kunlaborado-n“ kun IALA. Fakte tiu laboro ĉiurilate taŭgas por sukcesigi niajn celojn inter la gekolegaj kaj en la lernejoj. Sed ĝi restos vana, ĝi eĉ povos fariĝi iluzora, se ĝi ne helpas plifortigi nian fakan asocion „TAGE“ (Tutmonda Asocio de Ĝinstruistoj Esperantistaj). Ni bezonas tian organizacion. Aliĝi al ĝi estas nepra postulo, ĉar nur tiam la oficiala TAGE-gazeto, nia „IPR“, kiun ricevas ĉiu membro de TAGE, povas ekzisti. Ĝi ne plu povas ekzisti, se ĝia abonantaro ne kreskas. Ni bezonas abonantaron de 1.200 membroj, por ke la gazeta budĝeto estu en ordo. Nuntempe ni pro la tro malalta kotizo kaj pro la — sekve de la nesufiĉe granda abonantaro — ankoraŭ tro alta prezo de la gazeto ĉiam havos deficiton.

Permesu, ke mi atentigu vin pri via devo kaj bonvolu sendi al mi deklaron pri aliĝo al TAGE kiel eble plej baldaŭ. La „laborkomisiono por TAGE“ komisiis min, peti vian helpon. Mi esperas, ke vi plenumos mian peton kaj petas vin alsendi la deklaron de via aliĝo rekte al mi.

Martha Moelke,
sekretariino de „Kunlaborado“,
Berlin-Südende (Germanujo)
Brandenburgische Str. 5.

NB. Bonvolu sendi vian deklaron laŭ jena skemo:

Mi aliĝas al TAGE kaj estas preta, pagi ĝis la...
la kotizon de 1 dolaro por 1 jaro.

Nomo,

Detala adreso,

ESPERANTISTAJ KOKOJ.

(Babilado de Nulo.)

Cu vi scias kio estas koko? Gi estas birdo tre bela, plaĉa, precipe, se oni vidas ĝin majeste marŝi inter ĝiaj edzinoj-kokinoj sur ĝia sterkejo! Konata estas la fakto, ke tiu kavaliro inter la hejmaj bestetoj absolute ne toleras kunulon sur sia sterkejo. Du kokoj sur unu sterkejo estas vera raraĵo neniam videbla.

Ankaŭ inter ni, esperantistoj, estas kavaliroj, kavaliroj de kapabloj, laboremo, sperto. Sajnas al mi, ke ankaŭ tiuj ĉi kokoj neniam toleras sin reciproke sur siaj sterkejoj. Mi volonte kredas ke pli ol unu „sterkejo“ en nia movado enlanda estas necesa. Tamen neniun profiton al nia afero alportas, se ĉiu esperantista koko nepre kreas por si apartan sterkejon — tion mi devas nomi displito de fortoj. La modernaj fluroj pri ekonomia eluzado de ĉies fortoj, pri kunigado de fortoj ekzistantaj ŝajnas ne tro influu la menson esperantistan — domaĝe por la afero mem.

RH havas sian sterkejon (ĈAE) kun sia Progreso, Dro P. sian Instituton kun sia Preso, Skl. sian UEA kun sia Teritoria Tribuno, inĝ. B. sian BES kun siaj Esperantský Svět kaj Kalejdoskopo de l' vivo, f-ino Ŝ. sian Sdružení přátel Esperanta feliĉe sen plia gazeto. En provinco oni imitas la ĉefkokojn. M. E. P. ŝatas memstare kaj memnome eldoni verkojn. F. H. kun sia Ligilo, Tipo R. Kolář kun sia Internacia Informanto. Du esperantistaj kluboj en unu loko estas neniu maloftaĵo.

Krom la sterkejoj kokoj ni havas ankoraŭ kokojn, vivantajn en plena soleco. Ili fosas sian sulkon izolitaj volante vidi nek la aliajn kokojn, nek la kokinojn. Tipo: H K B.

Tipo de ideala koko esperantista estas nuntempe — laŭ mia opinio — Dro St. Kamaryt. Li aktive kunlaboras en ĈAE, Progreso, UEA kaj supezeble ankaŭ en la loka movado en Bratislava.

Meditante pri la situacio esperantista mi ĉiam pensas: Kiom imponan laboron certe plenumus ĉiuj niaj kokoj, se ili laborus harmonie mano en mano! La unua kondiĉo por tia prirevata kuniĝo de la plej bonaj fortoj en nia enlanda movado nature estus, ke niaj kokoj forjetu la ĉefan principon de l'koka filozofado: „La sterkejo estu kiom ajn malgranda — se nur MI sola koko estas sur ĝi!“*)

*) La redakcio denove disponigas lokon al la pseŭdonimita observanto. Antaŭ ol ni mem prenas parolon por respondi, ni volonte publikigos opiniojn de niaj legantoj. Red.

PROFESORO SAMOJLOVIĈ
PRI ESPERANTO.

Profesoro Rudolf Samojloviĉ, la kuraĝa esploranto de malproksima nordo, kiun konas la tutmondo kiel la savinton de la itala polusa ekspedicio en la jaro 1928, deklaris sin sincera amiko de esperanto.

La paroladoj de Samojloviĉ, kiujn li aranĝas en diversaj eŭropaj urboj, estas laŭ enhavo ĝuo por la aŭskultantoj. La 9an de decembro post la reveno de sia nova ekspedicio li vizitis denove la urbon Praha. Per simplaj vortoj li raportis pri siaj vojaĝoj, kiaj ne estis iam antaŭe faritaj. En plej grandaj glacirompaj ŝipoj de la mondo, la sovetuniaj „Krasin“ kaj „Sedov“, li venis en ekstreman nordon por fari tie sciencajn laborojn. Dum la ĵus pasintaj monatoj li starigis en la Lando de Francisko Jozefo kaj en la Norda lando radiostaciojn, kies regulaj informoj estas gravegaj por la meteorologio de la cetera mondo.

S-ro Otto Ginz, sekretario de ĈAE — kiu tradukis la koncernen norvegan verkon „Ærŝipe al norda poluso“, havis okazon paroli kun tiu eminenta sovetia sciencisto kaj aŭdis de li interesajn deklarojn koncerne nian komunan lingvon.

Jam en komenco de la interparolado diris prof. Samojloviĉ, ke li estis ĉiam amiko de esperanto kaj ke li konsideras tiun lingvon kiel plej gravan rimedon por pli efika kunlaborado inter la nacioj.

Li priskribis, kiom da lingvoj estis necesaj por interkompreniĝi kun la savitaj anoj de la itala ekspedicio kaj en kiom da lingvoj devis esti tradukitaj liaj paroladoj en la landoj de li vizititaj.

Ĝenerala enkonduko de esperanto signifus laŭ opinio de prof. Samojloviĉ precipe por plenumo de sciencaj laboroj valoran helpon. Li estis surprizita vidante la esperantan eldonon de la Andrée-libro, kies unua ekzemplero feliĉe la saman tagon nin atingis. Novaĵo estis por li ankaŭ la informo, ke por traduko de la norvega libro pri la polusa flugo de „Italia“ en aliajn lingvojn helpis esperanto. O. G.

KONSERVADO DE LA VOĈO DE NIA MAJSTRO ZAMENHOF SUR GRAMOFONDISKOJ.

La direktoro de I. C. K. en Genevo ĵus informis nin laŭjene:

„La I. C. K. sukcese intervenis ĉe S-ro Sabadell, LK, en Barcelono pri reproduktado de la sola fonograf-cilindro, per kiu la voĉo de nia Majstro, D-ro Zamenhof estas konservita. Ĝi delegis S-ron Gili Norra, eksprezidanto de la Kataluna Federacio, por traktado kaj esploro de la eblecoj. S-ro Sabadell, konservante rajte la cilindron kiel relikvon altvaloran, fine esprimis sian principan konsenton pri la reproduktado.

Montriĝas multaj teknikaj malfacilaĵoj, sed oni esperas ĉiujn venki. La Kataluna Esperanto-Federacio mem prenos sur sin la organizadon de la afero kaj tiucele ricevis la rajton de S-ro Sabadell.

Nuntempe ne povas esti dirate pli. La I. C. K. petas al ĉiuj interesitoj kaj intervenintoj ne plu adresi petojn al S-ro Sabadell, kiu dum la lastaj jaroj havis multajn ĝenojn kaj malagrablecojn pro afero en kiu li laŭjure rajtas decidi sola.

La I. C. K. ankoraŭ informos pri la progreso de la teknika esplorado.“

La esperantistoj certe ĝojos pri la saĝa cedo de S-ro Sabadell kaj la morala sukceso de I. C. K. en tiu ĉi afero, kiu havas altan signifon por nia movado .

BIBLIOGRAFIO

LITERATURO PRI LA INTERNACIA INTERKOMPRENIGADO.

(Bibliografio de internacia lingvo. Redaktis P. E. Stojan. Eldonis Bibliografia servo de UEA. Genève 1929. Pĝ. 560. Leksika formato. Prezo Fr. sv. 12.50 = 85 Kĉ.

Kiuj verkistoj en kiuj verkoj parolas pri la lingva haoso sur la mondo, pri malfacilaĵoj pro lingva diverseco kaj pri la neceso de helpa lingvo internacia? Kiuj personoj en kiuj verkoj faris projektojn de artefarita lingvo? Kiuj verkoj pri kaj en internaciaj lingvoj ĝenerale kaj pri kaj en esperanto speciale aperis ĝis nun? Kiuj verkoj estas plene aŭ parte dediĉitaj al problemoj ne sole de la parolata helpa lingvo, ĝia tekniko, organizo, historio k. s., sed ankaŭ al gestlingvo, simboloj, signaloj, cifroj, kodoj, pasigrafio, poligrafio, stenografio, al universala gramatiko, logistiko, algoritmo, al naciaj mondlingvoj ktp.? En kiuj verkoj oni povas trovi filologian, lingvistan kaj poliglota materialojn por internacia lingvo, vidpunktojn de filozofio kaj sciencoj, opiniojn de famuloj? Kie estas esperanto-presejoj? Kiuj esperanto-kongresoj okazis? Kiuj foiroj, urboj kaj ŝtatoj faras esperantan propagandon? Kiujn raportojn kaj reklamilojn ili eldonis?

Ofte vi tiel demandis kaj demandas, sed serĉante la respondon vi estus devintaj viziti multajn bibliotekojn kaj personojn, trastudi multajn librojn, katalogojn kaj prospektojn, fari vastajn enkentojn. Nu, tiun grandan kaj tedan, sed utilan laboron faris por vi malnova kaj aĝema rusa samideano P. E. Stojan, kiu en sia ampleksa verko „Bibliografio de internacia lingvo“ respondas detale ĉiujn suprajn kaj multajn aliajn demandojn. En lia verko vi trovas nekredeble grandan nombron de nomoj de personoj kaj de titoloj de verkoj (kun ĉiuj bibliografiaj indikoj, ofte kun citaĵoj aŭ komentario) tuŝantaj la supre aluditajn problemojn. Ĉiun parton antaŭiras klariga kaj revua artikolo, akompanas konvena bildo (de Descartes, Komenský, Leibniz, Volney, Code International Lugagne 1914, Couturat, Schleyer, Zamenhof, Palais de 64 fenêtres, Alice V. Morris) kaj en la fino sekvas kompara tekstaro kun specimenaj tekstoj en 64 lingvoj. Kiel vasta estas la kolektita materialo montras la fakto, ke objekta alfabeto indikso havas 170 titolojn, indikso de registritaj artefaritaj

M E N D U : Kĉ

- J. Herben: Malriĉa knabo, kiu gloriĝis (bibliografio de Masaryk) 16.—
- Dr. E. Privat: Historio de Esperanto (1900—27), 200 p. lukse bind. 48.—
- Remarque: En Okcidento nenio nova . 45.—
- Wels: La dormanto vekiga. Broŝ. . . 40.—
- Šilha: Uĉebnice esperanta se slov. . . 10.60
- Kühnl-Procházka: Slovník česko-esp. váz. 25.—
- Čánský-Riedl: Slovník esper.-český . . . 21.—

Staĉi napsat objednávkú na složenku Progresu.
Knihkupectví Jan Minář, Nymburk.

lingvoj 323 titolojn, persona indekso 2900 nomojn; la nombro de enkatalogitaj verkoj estas 6333, (ni publikigos interesajn resumojn en aparta artikolo). Firma skeleto, spino de la mondlingva problemo, historio kaj movado kuŝas antaŭ vi en tiu ĉi libro, kiu estas frukto de kelkajara laboro (1927—29) de pluraj personoj helpintaj al la ĉefaŭtoro.

Kiel la unua, ĝis nun plej kompleta historia bibliografio de mondlingva movado la libro havas grandan praktikan valoron, precipe, se ĝi estos de tempo al tempo kompletigata (rilate la tempon ne sole estontan, sed ankaŭ estintan). Kiel la unua bazo por vera scienca bibliografio la libro de Stojan havas rajton ne esti severe kritikata pro kelkaj mankoj, sistemo de ordigo aŭ idea vidpunkto. En tia unua verko sufiĉas fidinda kolekto de materialo, kiu en tiu ĉi okazo estis tre malfacile atingebila; la simpla kolekto jam sufiĉas tiom pli, ke la indeksoj ebligas ĉiuspecan uzon kaj rapidan serĉon. La verko faros grandajn servojn al ĉiuj laborantoj pri la mondlingva problemoj kaj ne lastvice al bibliotekistoj de esperantistaj societoj. Mi ne povas imagi esperantan bibliotekon sen tiu ĉi verko. Zorgu, ke ĝi estu en la biblioteko de via klubo! Vi posedos ne sole fakan kaj praktikan helpilon, sed ankaŭ efikan propagandilon, ĉar la libro faras fortan impreson eĉ je skeptikulo kaj malamiko de nia movado. Uzu tion!

H. K. B.

Internaciaj konvencioj pri fervojaj personpakaj kaj fretaj trafikoj. Tradukis J. Řebíček, Eldonis Moraviaj Esperanto Pioniroj en Olomouc 1930. La bela volumo de 254 paĝoj ciklostile multobligitaj per tre klara maŝinskribo enhavas tradukon de du interŝtataj fervojaj konvencioj el 23. 10. 1924. Ili estas plenaj de teknikaj terminoj precipe el fakoj pri trafiko kaj varoj. Estis tre malfacile traduki tiajn tekstojn kaj estas granda merito de la tradukinto, ke li kuraĝis tian verkon kaj ke li finis ĝin. Ankaŭ granda merito lia estas, ke li trovis por sia laboro diverslingvajn kaj diversfakajn kontrolantojn. Tiamaniere estiĝis verko tre atentinda laŭlingve, kiun devos detale studi ĉiuj verkantoj en koncernaj teknikaj sferoj. Multaj vortoj estas unufoje uzitaj en koncerna teknika signifo. La aŭtoro tre saĝe vokas al diskuto kaj plua provado pri la terminoj de li uzataj. Ni ne povas tion fari en tiu ĉi raporto. Tio estas farebla nur dum aliloka uzo de la teknikaj terminoj kaj parolturnoj kaj certe ne sole ni sed multaj verkantoj revenos al verko de Řebíček, kiu estas laŭ diversaj flankoj pionira. Ĝojinda fakto

estas la sukceso, kiun havis tiu eldonaĵo de Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Ni legis kun sincera ĝojo multajn rekomendajn raportojn kaj kritikojn pri ĝi. Sur nia paĝo 81. estas danko de la eldonintoj al iliaj kunlaborintoj kaj propagantoj. Ĝi informas la leganton pri la amplekso de la intereskampo. Pri la rezultato de la diskutoj ni informos pli poste kaj laŭ ebleco komplete.

S. K.

„Muž a žena ve Svobodném Zednářství“, jest spis, který po prvé v české literatuře pojednává o tomto tak zajímavém tématu. Mnozí ani nevěří, že existuje zednářský řád, který přijímá ženu za stejných podmínek a práv jako muže. Byl založen ve Francii v minulém století a snaží se odčinití vinu, která se stala vyloučením ženy ze zednářských prací. Při zavedení tohoto řádu do Československa hrálo Esperanto vynikající úlohu zprostředkovatele. Ze existuje v Paříži jedna lože zednářského mužského řádu, která nejenže nese jméno „Esperanto“, nýbrž která i pracuje v Esperantu, jest známo. Dnes arci již nikdo nevěří báhorkám o podvratné činnosti Svobodných Zednářů, protože oni zavrhnou každé násilí a mstu. Jejich zásady a snahy v mnohém následují ideálů učitele národů Jana Amose Komenského, jak je byl popsal ve své Panergesii. Jest dobře seznámiti se s jejich činností, která loyální ke státu v němž žije, snaží se povznést ducha lidského metodami, které vyžadují koncentrace a klidu duševního. Jen proto nechodí na veřejnost, protože tato jest plna nervosního ruchu, nepřátelského každé duchovní činnosti. — O tom všem bližší dočtete se v hojně ilustrované knize, opatřené vyobrazeními ze současného zednářského života, vydané našim samideánem V. Cimrem v Praze I., pošt. schr. 255 za Kč 20.—. Knihu tuto možno též objednat i v naší redakci.

I. S.



26. PŘEKŁAD TEXTU.

Sur la kampo nur tri grandegaj, por ili pretigitaj1) kaj de2) la tuta vasta kampo kolektitaj amasoj da terpoma foliaĵo3) lin gajigis kaj ĝojigis4). Vigle5) li komencis labori kun la ceteraj. Sed la foliaĵo kaj ankaŭ6) la alportita pajlo estis malsekaj7), ne estis bruligeblaj8), kaj krom tio9) komencis eta, malvarma pluvo10). Longe penetradis sole flavefa, rampanta11) fumo malrapide tra la nigriĝintaj

tigoj¹²) terpomaj, kaj jam ŝajnis, ke ili devos reveni ne gustuminte¹³) la bongustajn rostitajn¹⁴) terpomojn. Tial, kia ĝojo, kiam la fumo komencis ruliĝi el la amaso pli dense en ringformaj, pligrandiĝantaj buloj, kaj eĉ flamoj traflaĝis¹⁵). Rapide oni plubruliĝis¹⁶) kaj preparis la terpomojn en kaveton inter la terbuuloj.

Homo de Dio.¹⁷)

Poznámky:

1. preparitaj
2. též: sur, de sur, nikoli: el.
3. amasoj da trunketoj de terpomoj; pouhé foliaĵo nestaçi, nutno pŕidat slovo terpoma, de terpomoj.
4. plezurigis
5. méně: kuraĝe
6. nikoli eĉ
7. všimněte si množného čísla
8. ne estis flamiĝeblaj, ne taŭgis por ekbruli
9. méně: al ĉio
10. též: ete, malvarme pluvi.
11. též: serpentuma, apudtera.
12. též: trunketoj.
13. méně: sen gustumo de...; ne gustuminte
14. rosti = moliĝi per varmo (viandon); baki = malmoliĝi kaj sekiĝi per varmo (brikojn, kukojn).
15. elsaltis.
16. oni almetadis foliaĵon.
17. Dihomo — bohoĉlověk; dia homo — božský člověk.

Překlad tohoto textu zaslalo jenom 8 osob resp. korporaci: Feldmannová Zlaté Moravce, Feit Zlaté Moravce, Görtlerová, Praha, Esp. Klubo Hradec Králové, Jakoubě V. Hamry, Esp. Klubo Kladno, Kučera Kunovice, Střihavka Kladno.

Poměrně nejlepší byl překlad E. K. Hradec Králové, jímž zasíláme knižní odměnu.

V novém ročníku budeme v překladech pokračovati. Návrhy vhodných textů k překladu jsou nám vítány.

Adresoj. Kiu povas informi nin pri la nunaj adresoj de S-roj: Janko Zdeněk Roudnice, Calábek Jos. Praha.

Literatura Mondo, literární a umělecká revue, začla znovu vycházeti v lednu. Jednořadá čísla 6 Kč (ročně 60 Kč). Přihlaste se k odebírání (platit možno po každém čísle) u adm. t. l. Očekává se též přispívání čs. esperantistů.

MEMBROJ ATENTU!

La ĝenerala kunveno de ĈAE okazos en Praha la

19. Aprilo 1931

La detaloj aperos en la venonta Bulteno.

La venonta Bulteno enhavos ankaŭ informon pri la sukcesoj de la Dana filmo, precipe pri la neatendite brila vespero en Praha.

Z redakce. Zařadili jsme jako zvláštní číslo na konec 12. ročníku agitační číslo Svazového věstníku, neboť myslíme, že je třeba zachováti pro budoucnost záznamy o tom, s jakými potížemi jsme pracovali a s jakými samozřejmostmi museli jsme se obracet na veřejnost esperantskou i neesperantskou. Též i mezi našimi pravidelnými čtenáři je velký počet těch, kteří nejsou členy Svazu. I jim doporučujeme, aby si přečetli výzvu v něm obsaženou, a aby jí vyhověli.

AL LA LEGANTOJ.

Ni finas fine la jarkolekton 1930 kaj dankas al ĉiuj kiuj nin helpis en la malfacila tempo. Estas unuavice niaj kunlaborantoj, plie la abonantoj kiuj ĝustatempe pagis sian abonon kaj eĉ varbis novajn abonantojn. — La rondo de la ŝuldantoj ĉiam malgrandiĝas, sed estas bedaŭrinda la fakto, ke ankoraŭ nun, en februaro 1931, malgraŭ pluraj alvokoj en la gazeto mem, kaj spite la insistaj admoniloj kelkfoje senditaj dum la jaro al ĉiu ŝuldanto aparte, troviĝas „samideanoj“, kiuj ne pagas por tio, kion ili mendis kaj akceptis. Ni esperas, ke ili ne kuraĝos plendi, kiam ni traktos ilin kiel — ŝuldantojn.

Ni intencas forĵeti tiun balaston, liveri de nun nur por kontanta mono. Ni ne plu povas per neregula aperado ĉagreni tiujn, kiuj pagis kaj rajtas ricevadi la gazeton ĝustatempe.

La 1. kaj 2. n-roj estas preskaŭ pretaj. Post aldono de la plej freŝaj aktualajoj ili aperos maksimume en 14 tagoj. La 3. n-ro aperos ankoraŭ antaŭ la ĝenerala kunveno de Asocio, kiu okazos la 19. Aprilo, la 4. n-ro jam enhavos raporton pri ĝi.

R. H.

KLUBAJ ESTRAROJ,

mendu por via kluba biblioteko librojn pere de ni. Vi helpos per tio firmigi la ekziston de la gazeto.

Novinová sazba povolena ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze čís. 238.888/VI-23.

Eldonanto kaj responda redaktoro RUDOLF HROMADA. - Presis JAN MINÁŘ NYMBURK.